

**Cindy Mckee
Ĉineskas**



e-Librigita de Elerno

dec. 2009

En majo 2009, kiam nova poemo-grupo estis kreita en ipernity, mi tuj aliĝis kaj komencis partopreni. Tiu grupo estas *Ĉinesko en Esperanto*. La arto de ĉinesko jam vekis mian intereson; la nova grupo tute kaptis min. Mi ĝuas la rigoron de la skemoj, mi ĝuas la eĥon de kulturo tra epokoj, la densan rimadon, la muzikan efekton, kaj mi ĝuas la mensajn akrobataĵojn.

La grupo estas mia ludejo. (konsileto al aliaj: uzu rimliston: <http://esperanto-jeunes.org/ravo/ravo.html>)

Rata Vortaro tiras vortojn el Reta Vortaro kaj listigas ilin laŭ fina rimado.) Mia drola humuro trovas lokon en la poemoj; fakte, ĉiu penso kiun mi havas, trovas hejmon en poemo. Kiam Vejdo, la fondinto de la grupo (kaj redaktisto de *Penseo* kaj *Ĉineske*, respondeculo de *Elerno*, ktp.), diris ke li intencas krei ret-libron de miaj ĉineskaĵoj, mi iom ŝokiĝis. Libro dediĉita al miaj pensoj! Tamen, ne. Estas libro dediĉita al la ĉinesko. Antaŭen al la ĉinesko!!!

--Cindy

P.S. Ĝojplenan dankon al la artistoj kiuj beligas plurajn paĝojn!

Guozhu

REKORDO MEJLOŜTONA DE POETINO USONA

— Antaŭparolo al *Cindy Mckee* *Ĉineskas*

La nova libro (eLibro) *Cindy Mckee Ĉineskas* nun antaŭ vi, ne estas io ordinara, sed poemaro rara kaj kara. Ĉiu el ĝiaj trajtoj portas al ni progresivan ĝojon.

1. Antaŭ ĉio, ĝi estas poemaro de originalaj Esperanto-poemoj.

Esperantista leganto, eĉ sen kono pri ĉinesko, ankaŭ povas trovi en ĝi legad-ĝuon de originalaj poemoj. Pensante, ke ne ĉiu el ni kapablas versi en Esperanto poemojn kaj sukcesas pretigi ilin poemaro, mi admiras.

2. Due, ĝi estas poemaro de originalaj ĉineskoj.

En nia mondo, jam estas ne malmultaj poemaroj de originalaj Esperanto-poemoj. Tamen, individua poemaro el originalaj ĉineskoj, ankoraŭ ne tiel multas. Ĉar versi ĉineskon laŭ rigoraj skemoj por havi la belajn en sono kaj formo, estas malfacila arto eĉ por

ĉinaj aŭtoroj kun fono de ĉina kulturo kaj kono pri ĉina poezio.

3. La aŭtoro estas Esperantista, neĉina, virina kaj en aktuala nomo.

El la suprediritaj kvar punktoj, se ni apartigus ilin unuopaj, estas ne malfacile kontentigi unu flankon el ili. Tamen, se ni volus trovi iun, kiu estu konforma je ĉiuj kvar flankoj, ja estas tro peniga tasko.

Estas ne malmultaj Esperantistaj poetoj;
Estas ne malmultaj neĉinaj poetoj;
Estas ne malmultaj poetinoj Esperantistaj kaj neĉinaj;

Estas Esperantista poetino, kiu havas sian individuan poemaron de ĉineskoj, laŭ nia kono, nomiĝas Lily. Tamen ŝi estas ĉino, sub plumnomo.

De tia vic-post-vica selektado ni povas scii, ke homo, kiu karakteriĝas konforma je ĉiuj kvar flankoj suprediritaj, ne nur estas tro rara, sed fakte unika.

4. Jen estas la unua ĉineska poemaro, verkita de neĉina Esperantista poetino en la historio de ĉinesko.

Jam antaŭ multaj jaroj William Auld revis pri apero de neĉina poet(in)o, kies ĉineskoj meritas eniri la faman poemaron *Esperanta Antologio*.¹

La motivo, kial William Auld tiel revis, miasupoze eble pro la fakto, ke versado de ĉinesko (versi en neĉina lingvo laŭ skemo de ĉina fiksforma skemo) estas tro malfacila; sekve apero de neĉina ĉineskisto markas la nivelon de disvastiĝo kaj internaciigo de ĉinesko.

5. Eksteratendita rikolto : Troviĝas en tiu ĉi poemaro ankaŭ ĉineskoj en la angla lingvo.

Aŭtoro de tiu ĉi poemaro, Cindy Mckee el Usono, inspirate de legado kaj versado de ĉineskoj en Esperanto, kreive versis ĉineskojn ankaŭ en la angla, tiel fariĝante la iniciatinto de ĉinesko en la angla lingvo. Vere ĝojinde kaj gratulinde!

6. Tiu ĉi ĉineska poemaro (eLibro) aperas en bona tago (Zamenhof-festo) de bona jaro (Zamenhof-jaro). Duoble memorinda!

7. Tiu ĉi ĉineska poemaro (eLibro) aperas okaze de la Centjara Jubileo de la Ĉina Esperanto-Movado (1909-2009) . Ĉu la pioniroj antaŭ jarcento povus imagi pri la naskiĝo de ĉinesko kaj apero de neĉina ĉineskistino? Kiel bona omaĝo al la jubileo!

8. Tiu ĉi poemaro kreis plurajn rekordojn senprecedencajn, sed, la talenta aŭtoro ankoraŭ estas en tre vigla vervo por pli prospera versado; tial ni havas sufiĉe da motivoj por kredi ke el ŝia

plumo (aŭ klavaro) aperos pli multaj brilaj poemoj!

Okaze de la apero de la nova poemaro *Cindy Mckee Ĉineskas*, Guozhu humile donacas modestan ĉineskon.

Al Cindy Mckee

— laŭ ĉinesko Niannujiao (Ĉarma Kantistino)*
(2009-12-15)

En ĉineska / ĝardeno / centflore impona
ekaperas / jen Cindy, / poedin' usona.
Impresas nin / per talento, / freŝo burĝona,
diligento, / kreivo fruktdona.

Avino Bing'xin ja / diris pri la “Bel' / sep dekona”.²

Ĝuste tia / trajtas la / poemar' mir-sona.

Brilas la plej / nova rekordo/ mejloŝtona.

Ni kredu ĝin / furore famkrona!

* Niannujiao (念奴娇 Ĉarma Kantistino):
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj el 22 versoj
de 436, 436, 445, 46 / 654, 436, 454, 46 silaboj,
kun rimarangō xxa,xxa,xxa,xa/xxa,xxa,xxa,xa
(x = senrima).

Notoj:

1

[http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?
boardid=24&id=3645](http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=24&id=3645)

Leginte ĉineskojn, la granda poeto William Auld estis tiel entuziasmigita ke li verkis favoran recenzon *Ekjuku la poeta mano* kaj esprimis sian bondeziron ke: “Mi esperas, ke la tria eldono de *Esperanta Antologio* enhavu originalajn Ci-ojn ankaŭ de poetoj ne-ĉinaj.” (Fonto 175, p.29)

2

<http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=10&id=7564>

Vortoj de avino Bing'xin pri virinoj:
Se en la mondo ne ekzistas virinoj, tiam mankas al nia mondo 5 dekonaj da vero, 6 dekonaj da bono kaj 7 dekonaj da belo.
Guozhu opinias ke tio estas la plej klasika fama diro pri virinoj en la mondo.

国柱：

佳作定当风靡

—序《秦娣中国风诗集》

出现在读者面前的这本《Cindy Mckee Ĉineskas 秦娣中国风诗集》，不是一本普通的小书，而是一本“稀为贵”的世界语诗集。它具有多个特点，而且每一个特点，都带给我们一份递增的欢乐。

1. 首先，这是一本世界语原创诗集。

作为世界语读者，即使还不知道什么是 ĉinesko（中国风），也能够从这本书中享受到阅读世界语原创诗歌的快乐。用世界语写原创诗歌，而且成集，不是每个人都能够办到。

2. 其次，这是一本中国风原创诗集。

世界语原创诗集，在全世界范围内、已经有了不少可是用世界语原创的中国风诗歌，成为个人诗集的，就 不 多 了 。

因为，中国风诗歌讲究倚声填词，要符合中国词牌的“音美”和“形美”。即使对于具有中国文化背景的中国作者来说，也不是一件容易的事情。

3. 作者是世界语诗人，非中国的，女诗人，而且使用了真实的姓名来写中国风。

以上四点，若是分开来，单独地看，合乎其中一项者，不在少数。合起来，则是至为苛刻了。

世界语诗人，不少；非中国的世界语诗人，不少；非中国的世界语女诗人，不少；写中国风的世界语女诗人，拥有个人诗集的，已知有一位李莉，但她是中国人，而且不用真实的姓名。

可见，同时合乎这四项要求的人，不仅是凤毛麟角，简直就是绝无仅有。

4. 这是中国风发展史上，第一本由非中国世界语诗人（女）写成的中国风诗集。

由非中国的世界语诗人来写中国风，而且达到能够进入《世界语诗歌选集》的水平，这是威·奥尔德多

年的愿望（注1）。究其原因，实在是因为中国风（用外语填中国词）太难写。若是能有中国以外的世界语诗人写出个人的中国风诗集，代表了中国风普及和国际化的程度。

5.锦上添花的特点：书中还有用英文写成的中国风诗 歌 。

本书的作者，为美国世界语者秦娣（Cindy Mckee）。她因读中国风，写中国风，爱中国风，进而创造性地用英文来写中国风，成为把中国词牌引入英语诗歌的第一人。可喜可贺！

6.这本诗集（电子版）发表的时间，是柴门霍夫年（2009）的柴门霍夫节（12-15）。这是双倍的吉祥时 刻 ！

7.这本诗集发表的时候，正好是中国世界语者隆重庆祝“百年中国世运”（1909-2009）的时刻。百年之前的前辈们，可曾料到：中国的词牌能够进入世界语诗歌，外国的作者以之写诗成集！这是多么好的献 礼 ！

8.这本诗集创造了多个空前的纪录，而从作者创作势头来看，正是兴旺时期，前景未可限量，所以我们完全有理由相信，作者定会有更多更新的佳作问世 。

《秦娣中国风诗集》问世之际，国柱赋小诗为赠：

念 奴 娇 · 致 秦 娣

(2009-12-15)

百花园里，中国风，盛况令人欣喜。
崭露头角，有美国、诗人芳名秦娣。

印象深刻：才华出众，更蓬勃朝气，
勤奋笔耕，创造骄人成绩。

冰心曾说女人、占世上美丽、十分之七。（注2）

如此特点，恰正是，秦娣诗词雅辑。
历史纪录，最新里程碑，重大意义。

吾人坚信：佳作定当风靡！

柴门霍夫年之柴门霍夫节

[注1]

[http://www.elerno.cn/bbs/dispbbs.asp?
boardid=24&id=3645&star=1&page=18](http://www.elerno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=24&id=3645&star=1&page=18)

世界语大诗人威廉·奥尔德读到了 ĉineskoj 之后，非常之高兴和激动，他写了热情洋溢的推介《诗人们为之技痒》，表达了他的一个愿望：“我希望，在将来出版的《世界语诗歌选集》第三版中，也要收入由非中国世界语诗人们按中国词牌写成的世界语原创诗歌。”（源泉，第175期，p.29）

[注2]

[http://www.elerno.cn/bbs/dispbbs.asp?
boardid=10&id=7564](http://www.elerno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=10&id=7564)

冰心老人有一段论女人的名言：“世界上若没有了女人，这世界就会少了十分之五的真，十分之六的善，十分之七的美。”

Guozhu

Record Milestone by an American Poet

— Foreword to *Cindy Mckee Ĉineskas* (Ci-verses)

The new book (ebook) *Cindy Mckee Ĉineskas* now before you, is not something ordinary, but an anthology rare and dear. Every one of its traits brings us progressive joy.

1. Above all else, it's a collection of original Esperanto poems.

An Esperantist reader, even without knowledge of Ci poetry, can find in it the enjoyment of reading original poems. Realizing that not all of us are capable of creating verse in Esperanto and successfully readying a collection, I admire this.

2. Secondly, it's a collection of original Ci poetry. In our world, there's not just a few collections of original Esperanto poems. However, an individual compilation of original Ci poems is still not common. Because versing in Ci according to rigorous schemes, to have beauty in sound and form, is a difficult art even for Chinese authors with the background of Chinese culture and a knowledge of Chinese poetry.

3. The author is an Esperantist, non-Chinese, female and using her actual name.

With the above three points, if we separate them it

wouldn't be difficult to satisfy one condition. But, if we want to find someone who conforms to all those, the task is too trying.

There's not just a few Esperantist poets.

There's not just a few non-Chinese poets.

There's not just a few female poets, both Esperantist and Chinese.

There is an Esperantist female poet who has an individual collection of Ci poetry, who according to our knowledge is named Lily. However she is Chinese and writes under a pen name.

By that one-by-one listing we can realize that a person who meets all those traits not only is rare, but in fact, unique.

4. So, this is the first Ci collection written by a non-Chinese Esperantist female poet in the history of Ci poetry. Many years ago, William Auld dreamed about the appearance of a non-Chinese poet, whose Ci poems merit inclusion in the famous collection *Esperanto Anthology*.¹

The reason for his desire, I suppose, is possibly because of the fact that creating Ci (to verse in a non-Chinese language according to the scheme of Chinese fixed-form structure) is too difficult; so appearance of a non-Chinese Ci poet marks the spread and internationalization of Ci.

5. Unexpected harvest: In this collection are also several Ci poems in English. The author of this collection, Cindy Mckee of the United States, inspired by reading and composing Ci in Esperanto, creatively versed also in English, thus becoming the initiator of Ci in the English language. Very worthy of congratulations!

6. This Ci poem compilation (ebook) appears in a good day (Zamenhof Day), in a good year (Zamenhof Year). Doubly memorable!

7. This Ci collection appears during the Centennial Jubilee of the Chinese Esperanto Movement: 1909 to 2009. Could the pioneers of a century ago have imagined the birth of ĉinesko (Ci in Esperanto) and the appearance of a non-Chinese Ci poet? What a good homage to the Jubilee!

8. This compilation set several unprecedented records, but the talented author is still in vigorous form for even more composing; so we have good reason to expect that from her pen (or keyboard) will come even more brilliant poems!

For the appearance of the new poem collection *Cindy Mckee Ĉineskas*, Guozhu humbly donates a modest Ci.

To Cindy Mckee

— in the tradition of Ci, form Niannujiao (Charming

Singer)*

(2009-12-15)

In a Chinese / Ci-garden / hundred flowers impress
onto the scene / comes Cindy, / poet in the U.S.
Impresses us / with her talent, / burgeoning freshness,
her diligence, / and creative progress.

Grandmother Bing'xin said / about fair beauty:/
"Seven-tenths bless".ⁱⁱ

Exactly that / trait is in / these poems where sounds
caress.

A milestone reached; / shines a new record;/ what a
success.

Let's ardently / our excitement express!

*Niannujiao (Charming Singer): Chinese fixed-form
poem of two stanzas, in 22 verses of 436,436, 445,
46/654,436,454,46 syllables, with rhyme arrangement:
xxa,xxa,xxa,xa / xxa,xxa,xxa,xa (x= unrhymed)

Notes:

i. [http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?
boardid=24&id=3645&star=1&page=18](http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=24&id=3645&star=1&page=18)

Reading Ci poetry, the great poet William Auld was so
enthusiastic that he wrote a favorable review *Start to
Itch, Poetic Hand* and expressed his wishes that, "I
hope that the third edition of *Esperanto Anthology* will
contain original Ci poems also from poets who are not

Chinese." (source 175, p. 29)

ii. <http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=10&id=7564>

Words from grandmother Bing'xin about women:
If women were not in the world, then our world would lack five-tenths of truth, six-tenths of good and seven-tenths of beauty.

Guozhu believes that is the most classic famed proverb about women in the world.

Angligo de Cindy Mckee



Pentrajo 'Savanna at the Lake' de Alina Bradford

Vejdo

Fraŭlin' Laŭdinda

Okaze de la naskiĝtago (2009) de Cindy Mckee

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun

**el Usono
multescia
bela fraŭlin'
kolektas fruktojn
en parnasa
ĉina ĝarden'
ŝia obstin'
jam produktas
ĉineskaĵojn
diverspecajn kvindek kvin
laŭdinde
ŝi daŭre strebas
por bona fin'**

**kiel akvamarin'
ŝi glimas
en ĉineska min'
per muza talent'
ŝi zorgeme
delikate
per korinklin'
al poezi'**

**de ĉin-stilo
verkas pene en fascin'
senĉese
daŭrigu kara
usonanin'**

Angligo:

Laudable Lady

On the occasion of the birthday (2009) of Cindy
McKee

—in the tradition of Ci, form Qinyuanchun

from the U.S.
a well-informed
pretty fräulein
collects fruit in a
Parnassian
chinese garden
her stubborn spine
now produces
in forms of Ci
twenty-five poems in a line
laudably
she regularly
strives for form fine

an aquamarine shine

she glistens
in a chinese mine
with muse's talent
she carefully
delicately
as bards incline
to heartfelt verse
she styles chinese
raptly striving to refine
constantly
continue, oh dear
Yank friend of mine

Al Cindy Mckee

—laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo

**vi kara
en uesta for'
kun ĝojo plukas kordojn
de antikva ĉina vjol'
kun rava fervor'**

**disflugas
bela melodi'
adaĝa aŭ alegra
kun notoj de emoci'
kaj kun senta pi'**

**vi kara
en lontana lok'
sendas jen amikecon
de granite dura rok'
dum reta epok'**

Angligo de Cindy Mckee:

to you, dear
in the distant west
with goy you plucked ancient strings,
a viol from China's chest,
with delightful zest

soars outward
a beautiful song
adagio or allegro
with notes of emotion strong
nurtured true and long

oh, you dear
while so far away
solid as a granite rock
you can real friendship convey
in the online day

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de
55,75 silaboj kun duona rimo

Via Amludo

**Vian amludon
mi volas ludi
He! Skuu min ekscite
volas min trudi**

**en songoj viaj
kiel malprudi?
Do! pri tiu problemo
mi iras studi**

Aŭtuna Sento

**flugantaj plumoj
la suno saltas
radio adiaŭa
ĝi min ekzaltas**

**Banita en ĝi
ravite haltas
ĝiskisas min hieraŭ
kaj nokt' kobaltas**

Aŭtun-altano

**aŭtun-altano
la panoramon
almontras; flosfolio
en vent-dinamon**


**li sur altano
vidas ĉiamon,
ne nur riveron, teron
Sendas deklamon**

**'De sur altano
stiru penspramon
en esperoriveron
lasu iamon**

**de agonio
turnu flosdramon
la tero estas morto
celu verdjamon'**

**Elektis vento,
trablovis gamon
ĝis regis esperpensoj
la stirprogramon
Al sur rivero**

**kaj en balzamon
Forlavas fluo morton
en neniamon**



'Gamla brúin' de Halli Magg

Caisangzi (Moruskolektanta

Knabino)

du strofoj po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimarangô de xa, a,a (x=senrima)

Epitafo por Bestoj

(1) Diksi

Ŝi loĝis en kaĝego
ĝis la morto
fine, porto
al mia granda korto

Hundo ne destinita
por la sporto
aŭ komforto—
truiras: mi, eskorto

(2) Ringo

Landlima ŝafohundo
nomo Ringo
plaĉis kringo
al lia ventro-ingo

malĝoja tago venis.
en pudingo
ja ŝilingo—
sufoka vivestingo!

Chaitoufeng (Feniksa Harpinglo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1*, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

Ĝis, ĝis, Mikrosofto!

**Libero
sur tero
mikrosofta vespero—
rezignu
kaj signu
adiaŭon!
Ni asignu
Gnu
Gnu
Gnu!**

**Prospero,
kohero,
ankoraŭ en utero
Disĉiplu
kaj kuplu
komputilon
Ĝin ni staplu**

**plu
plu
plu!**

Paĝo ĉe la projekto Gnu:

<http://www.gnu.org/philosophy/free-sw.eo.html>

Siesto

**siesto
seĝnesto
mi revis ĝis molesto
ĝenis muŝ'
per flugtuŝ'
mi laŭtkriis
Ĝi diris, 'Ŝuŝ' !
Huŝ, Huŝ, Huŝ!**

**nur besto
sed gesto
estis vana protesto
al sur buŝ'
per babuŝ'
mi frapis ĝin
erara fuŝ'
Duŝ', Duŝ', Duŝ'!**

Chaozhongcuo (Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive, de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa / xxa,xa (x=senrima).

Dankon!

**sekfluis puna vundo
sekco en grundo
mi estis dezerto
Okazis inundo**

**pluvo nutris
min kurace
amabundo
via vivigis min
Dankon pro fekundo**



Pentrajo 'Purple Canna' de Alina Bradford

Daolianzi (Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Fero

**al mia
mondsfero
minacas timafero
juna stelo lumiĝas
tra hejma atmosfero**

**forĝfajro
de fero
en via fotosfero
fulmegas trans vakuo
sen franĝa interfero**

Dielianhua (Papilio Super Floroj)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 5 versoj de
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

George Smith, asiriologiisto

**bankbileta gravuro—
la metio.
Al studplezuro
li sin donis, futuro—
venonta aventuro**

**Asiria kulturo
en argilo—
koda obskuro
nun malferma strukturo
dank' al tiu figuro**

*Mi volas skribi ion pri George Smith, kiu malkodis multegajn asiriajn kojnform-skribsistemajn tabulojn, inkluzivante la faman **Epopo pri Gilgameŝo**, la plej malnovan verkon iam. Kiam li estis 14-jaraĝa, li devis forlasi lernejon kaj fariĝi lernoknabo de gravurado. Proksima museo tentis lin kaj li instruis sin mem pri kojnskribo tie. Fine, li estis sendita al antikva Ninevo, por trovi pli da pecoj de argiltabuloj...nu, anstataŭ komenci la tekston, mi trovis min skribante ĉineskaĵon.*

Dingfengbo (Subigo de Ŝtormo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive, de 7,7;7,2;7; / 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimaranĝo aabba / ccdeed

Kiu viktimo?

**vi venas sen pasporto
nevivpova aborto
de patrujo forvelka
kelka
Nenombrita eksporto**

**ĉi tie nur ĝenkventa
vanta
kiel subŝua cimo
amaso da malhomo
Nomo-
alia krom viktimo**

Anglalingva versio:

What Victim?

--in the tradition of Ci, form Dingfengbo

You come without a passport
nonviable, so abort
from motherland long since flagged
Untagged
uncalculated export

Here, only a vexing sum
irksome
a bug on our shoe-bottom
nonhuman brute crowd that came
your name -
anything besides victim

Akcepto

**Vivo estas demono
kun ŝira, dorna krono
por moke nin dekori
Glori
nin sur morttera trono**

**Vivo estas korife'
ridfe'
gvidante nin en danco
solvante nin en gloro
Ĥoro
plurvoĉa terromanco**

Vesperaj ĝuoj

ventkareso tra haroj
babilo kun najbaroj
krespuska fora trilo
brilo
tra arbaj suncidaroj

velura stelpeplomo
domo
dormeme ennestiĝas
vindita inter saten'
amen
sonĝomondo estiĝas

Matena ekzerca ĝuo

piedfingroj en roso
altaj brakoj en flosa
mi naĝas en aero
ero
ondmova homlotoso

saluto al la suno
kuno
mi kaj ĝi, aerfloroj
puriga, fina spiro
iro
al mensekzercaj horoj

Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj po 8 versoj
de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa
(x=senrima)

Novgvinea papilio

**Ŝi sidas surplanke kun romano
krajono
kaj banano
preĝante
planante
sort' en mano
la sola
legpova infano**

**Patrono venas de sama klano
semas trans
oceano
plugante
plantante
veterano
de revoj
kaj luktoj por pano**

**Bananoj verŝajne estis unue malsovaĝigitaj en la*

regiono de Papuo-Novgvineo, kiu estas unu el la plej diversaj kaj plej senhavaj landoj en la mondo. Tie ekzistas ĉirkaŭ 850 indiĝenaj lingvoj kaj samkvanto da socioj kaj klanoj.

Anglalingva versio:

New Guinea Butterfly

--in the tradition of Ci, form Fendieer

(Butterfly)

She sits on the floor with a book quite thin

banana

and an inkpen

daydreaming

plans in hand,

objects destine

No other

halfway literate kin

Her patron is from the same clan of men

sows across

a sea sanquine

plowing minds

planting books

veteran

of fights for provision

Fengrusong (Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj
respektive, de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ
rimarangô a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa (x=senrima)

Venanta verdestaĵo

**estaĵo en skulpturo
kontraŭ dommuro
grimpantoj ĉirkaresas—
Ne ploru
nia turo
ni dancas adore
laŭ via konturo**

**vivanta, verda ŝnuro
verda tinkturo
elverŝas premimpresojn
al sur la blanka puro
dum ili amkantas—
vi estas nurnuro**

Anglalingva versio:

Eventual Verdant Being
A being in statuette
against parapet

climbers tendrilly caress-
please don't cry



Desenhão 'la Espero' de Eder Benedetti

our minaret
we dance adoringly
along your silhouette

A living green plaited net
green dye foliate
pour out pressing impressions
on whiteness immaculate
while they sing lovingly-
you're something separate

Genglouzi (Kanto de Akva-

Horloĝo en Nokto)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 6 versoj de 33,6;
33,5; / 33,6;33,5, laŭ rimaranĝo xaa,xbb / xcc,xdd (x=
senrima)

Late Hour


—in the tradition of Ci, form Genglouzi (Song
of a Water Clock in the Night)

I.

Heavy night
the clock drips
veiled hand the arrow grips
falling leaves
scraping pane
rasping glass watch chain

Heavy sheet
bed narrows
calloused hand skin harrows
mattress thins
stretched out long
late hour trailing song

II.
Exhaled breath
inhaled slips
in cells a timer trips
calling drops
through each vein



Pentrajo 'Serço de la suno' de Jomo Ipfelkofer

trailing slow they drain

He comes to.
Hears sparrows
sees the clock lacks arrows
Where's the time?

just lifelong
yours we won't prolong

*note: one type of water clock is a dripping
water clock with a mark rod called an arrow.
This kind is known as a sinking arrow clock.*

Nur Nigro sur Blanko

vortvico
tuŝmanko
nur nigro sur blanko
batu min
palppreme
inkanateme

vortdamno
sterilo
ribela ekzilo
nasku min
kvinsente
korpkompetente

Heshengchao (Gratulo al Sankta Dinastio)

Ĉina fikforma poemo el du strofoj 4 kaj 5 versoj
respektive, de 7,5,75 / 44,5,75 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)

Duno

I.

**Li paŝas en aŭtuno.
Blovis fortuno
dum printempa freŝeco
dum alta suno**

**Li memoras.
Dum vivbruno
dum alta luno.
Kie staris verdeco
sterniĝas duno**

II.

**Li konstruas en nuno
aĵon de tuno**

**lerte, de la sableroj,
de oportuno**

**Li enverŝas
en sablkuno
akvon. Laguno
kreita, dum la vintro
lanĉiĝas skuno**

Anglalingva versio:

Dune
in the tradition of Ci, form Heshengchao

I.
He moves step by step in fall
He heard fortune call
during springtime's fast freshness
during high sun's crawl

He remembers
during life's pall
during high moon's stall
where stood a verdant forest
creeping sand dunes sprawl

II.

He builds in now's hallowed hall
a rising, great wall
expertly, from tons of sand
crafted from life's gall

He pours water
in his sand ball
creates a lake small
and during his wintertime
floats a schooner tall

*noto: 'sablkuno'. Mi scias. Mi scias. Terure. Kiu
elparolas 'blk'? Neniu. Mi hontas.*

Heyebei (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksfirma poemo el 6 versoj de 6,2;3;7,2;3 silaboj,
laŭ rimaranĝo aab,ccb

Apogo

**Surgrundaj radikoj
spikoj
enagre
foliojn mi vipas dume
bume
ventmagre**

*glosoj: bumo estas elstaranta velstango kiu streĉe
pivotas.*

agro estas kulturata kampo

Anglalingva versio:

Support

--in the tradition of Ci, form Heyebei

Corn roots brace above ground

outbound

in again

As their foliage I fight

upright

whisper thin

Tasktempo

torentas la tagoj
agoj
tasktempo
ŝrumpas songôj, fantomoj
kromoj
de tempo

**En kelkaj tagoj, mi ne estas lotuso, kaj
vivo ne estas taso da teo**

trepita doloro
floro
fetora
homo de Oklahomo
gnomo
tumora

Alta homo

jam haltis la agoj
plagoj
haltigas
sed la cerbo aktivas
vivas
altigas

Toleru

**ostuêa tempesto,
testo.
Suferu
Englitos lanuga briz'.
Dum kriz'
toleru**



Pentrajo de Cindy Moon (Mckee)

Huanxisha (Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

Hundo ĉenita

**Vi palpas ĝin viscere
vualas vin ekstere
Li vundus vin severe**

**se penso eĉ emanus.
Estiĝas efemere
memeco. Pasis, vere.**

Anglalingva versio:

Dog on a Chain

—in the tradition of Ci, form Huanxisha (Silk-washing Stream)

You probe it internally
veil yourself externally
he'd punish you infernally
if a thought just emanates
flits noneternally
personness. Passed vernally

Jiangnanchun (Printempo Sude de Rivero)

Ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj,
laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

South of the River

—in the tradition of Ci, form Jiangnanchun
(Springtime South of the River)

raft over
the river
green spongy carpet
green voices quiver
in newness careful stepping
cool moss makes my feet shiver

Jianzi Mulanhua (Mallongigita

Melodio Magnolia)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7;
4,7 silaboj kun para rimo.

La temo estas limonado

**porda puŝo
tiam tenera tuŝo
buŝa suĉo
ĉerpo el suka kruĉo**

**lekas lango
globajn gutojn de vango
gluta glito
likva kisoekscito**

Pacama Obama

**Sendu trupojn
ne neglektu okupojn!
venkodevo
fiera kapolevo**

**fifiero
al plua land-kapero
tanko-ŝafto
ĉu teroro aŭ nafto?**

**via paco-
tuta kapitulaco
hontigas nin
kiuj voĉ-elektis vin**

**ŝankro-lango
ŝanĝas pacon al sango
malsincero
daŭra uson-ulcero**

Kuxiangsi (Profunda Sopro)

ĉina fiksfirma poemo el du samaj strofoj po 8 versoj
de 7,33,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x =
senrima)

Impulso de Dio

**Eksplodiga preludo
tamburis / novludo
La tempo estas aludo
al dia / inkludo
de nia / konkludo**

**Universa etudo
Finala / apudo
Postpone forfadas studo
Okazos / eksudo
Karbona / vivkrudo**

Anglalingva versio:

In an explosive prelude
drumbeat a new pursuit
The concept of time does allude
to god's choice to include
a law that we conclude.

This universal etude-
finale soon is cued
away fades first impulse ended
and we will then exude
our carbon core life-crude



'Cosmos (Kosmo)', pentrajo de André Garant (1923-2003) ; kopirajto : Marie-José Longtin

Litingyan (Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 66,
76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Ŝvita laboristo

**Brano flosas, foras
postdraŝe spirala
laboristo turnas sin
al frukto opala
ŝvito gutas sur
stako krizokala**

**Fumo flosas, foras
postŝvite vuala
restas rikoltaĵo nun
perpene reala
Ĝis lastguto li
estas ideala**

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 5 versoj de
66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)

Kiu pasigas la jarojn?

**Mi volas rakonti:
Loĝas feo fola
ventkapa kaj frivola
kun kuniklo
sezonkaĵola**

**besto saltas, floras!
stepo gladiola!
dum kuŝas, nekropola.
Pri vilo kaj fe'
estu kontrola**

**Mi legis ĉinan fabelon Groto de feoj, pri feoj kiuj posedas blankan leporon. Kiam la leporo saltas, floras. Kiam ĝi kuŝas, floroj velkas.*

Anglalingva versio:

Who Makes the Years Go By?

--beginning exercise for Linjiang-xian (Fairy at
a River)

I have a little tale:
There lives a bad fairy
she is all light and airy
and into rabbits
who seasons carry

Rabbits jump, flowers bloom
all over the prairie.
Rabbits crouch, time to bury.
Of fur and fairy
let's all be wary

**I read a Chinese fable, The Fairy Grotto, about fairies who possess a white hare. When the hare jumps, flowers bloom (and time passes). When the hare lies down, the flowers fade away.*

angla ĉinesko:

*Kara Vejdo,
Mi rapide skribis anglan Linjian-xian. Estas tiel amuze,
ke mi tuj volas sendi al vi:*

I received a challenge!
Yessir, says the sender
Girl, your chances are slender
chant your sundown song
Cindy, surrender

I'm an obstinate ass
could be a contender
for most patent pretender
But, she set me straight
Pain? She's the vendor!
:)

Humure, Cindio

--

Cindy McKee

Cindio

Skribas Vejdo 2009-7-7 12:07:34

fakte, angla lingvo estas pli taŭga ol esperanto en
verkado de ĉinesko, ĉar en angla lingvo troviĝas pli
multe da unusilabaj vortoj ol en esperanto. Malfeliĉe
neniu enkondukis ĉineskon en anglan lingvon. Cindy
donis bonegan ekzemplon!

Versis angle Cindy McKee. Esperantigis Guozhu

Guozhu

Ĉinesko Linjiangxian

Mi ricevis ganton--

defia elsendo.

Kant' pri sun' en descendo.

Ŝancoj malmultas.

Cindy, falendo!

**Mi estas azeno
de obstina gento
por patenta pretendo.
Sed al mi bato,
ŝi as por vendo!**

Noto:

Kun granda ĝojo mi legis en la suba ret-adreso la novan poemon de usona esp-istino, s-ino Cindy McKee.

Mi opinias tion "Poemo negranda, sed signifo granda". Ĉar ĝi estas la unua ĉinesko versita en la angla lingvo. La aŭtoro, nia kara Cindy McKee, unue kontaktis kun ĉinesko en Esperanto. Ŝi ekŝatis, kaj mem versis, post versado de pli kaj pli multe da ĉineskoj, nun ŝi kondukis ĉineskon en la anglan lingvon. Tiu ĉi nova poemo markas la eniron de ĉinesko en la alian novan lingvon, nature kun mejloŝtona signifo. Guozhu prove faris esperantigon kaj ĉinigon por ĝi. En la samforma traduko mi ofte sentas ke la transdono de versa mezuro (silaboj) estas tre malfacila. Kaj ekmemoras alian faman diron:

Traduko estas perfido.

非常高兴在下面的地址读到美国世界语者Cindy McKee的新作：英语中国风。
国柱以为这首小诗有大意义。这是我见过的第一首

用英语写成的中国风，而作者首先是接触到用世界语写成的中国风，感到喜欢，自己写了许多首之后，诗兴大发，进而用英语写成了这样一首新作。标志着中国风进入到另外一种语言，具有里程碑的意义。国柱试着作了世界语和汉语的翻译。感到在音节数目的控制方面，难度很大。不由得想起了另外一句名言：翻译即背叛。

<http://www.elerno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardID=24&ID=9265&page=1>

临江仙·戏作英语中国风

接到一封挑战，
来者话语猖狂：
姑娘，唱歌叹夕阳，
机会不多矣，
秦娣快投降！

我偏要来竞争，
傻瓜生性倔强。
岂料求胜成妄想，
直接遭痛击，
难敌街女郎！

秦娣 Cindio 原作 国柱汉译

Manjiangong (Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de
434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive,
laŭ rimarangô xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x =
senrima)

Ruĝa rivero

**Argilplena
riĉruĝo
de argilo
mi filtras
tribajn lingvojn
en distilo
likva lango liveras
voĉojn antaŭ ekzilo
mi modlas
likvan poton pri
vivstilo**

**Jen suda
vigilo
Teksasa
gracilo
de vakerkarno**

**asimilo
ruĝigas min ĝis Golfo
mi paŭzas ĉe pesilo
hompeza
miksas mondakvon
kun ĥilo**

**La Ruĝa Rivero estas la landlimo inter Teksaso kaj Oklahomo. Antaŭe, Oklahomo estis Indiana Teritorio, kaj nuntempe, la diversaj triboj estas suverenaj, sendependaj nacioj. Sude estas la subŝtato de Teksaso, plena je vakeroj kaj sendependa spirito. La Solstela Ŝtato estis suverena lando dum mallonge. La Ruĝa Rivero estas ruĝa pro la enhavo de argilo.*

Anglalingva versio:

Red River

--in the tradition of Ci, form Manjianghong
(River Fully Red)

Clay full I am
rich and red
through this their clay
I filter,
leach tribal tongues
and wetly play
my liquid tongue delivers
discourse from an ancient day

inscribe in
liquid pottery
the old way

Then southward
I survey
strong Texas
I decay
the clay of cowboys
I will convey
redly, rushing, to the Gulf
I pause at the port to weigh
my peoples
then mix world's water
in my spray

Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimarangô xa,a,a (x=senrima)

Ina hasto

**Mi ŝiras ŝtofon
ĵetas balaste
proponas min bombaste
vin malbutone tentas laste**

**Rapidaj manoj
vin sternas haste
atakas nun gimnaste
enire vin venigas gaste**

Niannujiao (Ĉarma Kantistino)


ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 436,
436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo
xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Infano en Mizero

**ena kanto
de knabo
stumblas dum malsato
disonanco
missonas
tra interrilito
ke ni sentu
alĝustigu
ĝis akordstato
panon donu
pro vera kompatato**

**ni dampos vibradon
donos kvieton per
paŭzfermato
ĉiu el ni
private
sen helpo de ŝtato
pli efike
adaĝon kreos**

**sur la strato
lantkadence
sed, sen ekspluato**



'Kantoj de Cheng Mu'. Inkodesegnaĵo de Sébastien Garant, laŭ foto de Y. Layma en la libro La mer des chansons, Pays des Dongs, Nathan, Paris 1991

Pozhenzi (Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

Neda*

**Persio regata
de menso obseda
Kantas antikvaj voĉoj
pri kulturo hereda--
aldonu Neda**

**Spirita gvidanto
spirito poseda
Kantas juna spirito
leviĝas voĉo pleda--
memoru Neda**

**Neda estis junulino kiu partoprenis en paca manifestacio kontraŭ la forpreno de voĉdonrajto en Irano. Kuglo de kaŝpafinto forprenis la vivon de Neda. Ŝia nomo signifas voĉo en la persa (farsi) lingvo.*

Anglalingva versio:

Neda

—in the tradition of Ci, form Pozhenzi (Knight's Dance) *[with exceptions to form in 2 lines

that include the name Neda]

Persia is now controlled
by a mind obsessive.
Voices from antiquity
sing of culture impressive-
Add Neda*

The Spiritual Leader
a spirit possessive.
A young spirit sings its soul
rises a voice progressive-
Remember Neda*

Pri neĝa katastrofo

**de neĝo ĝis ĝeno
time metateza
super la norda lando
flosas beleco leza
floko senpeza**

**kia kontraŭeco
senpezeco premas
beleco malbeligas
jen, naturo blasfemas
mi dube ĝemas**

Pusaman (Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de
7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo


Bezono de seneco

**Mi staras negative
samloke, relative
Atomoj dancas
de mi distancas**

**Mi ĉion manifestas
ne io-eco estas
sen mia sed-o
kaj sena knedo**

Anglalingva versio:

My Lack is Needed
—in the tradition of Ci, form Pusaman
(Buddhist Dancer)



I stand in negative space
it is my usual place
atoms dance elsewhere
forming in live air

Everything needs me
somethingness can't be
without void me-swarm
Lack of form shapes form

Qingpingyue (Serena Muziko)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,5,7,7 / 6,6,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,a / a,a,xa (x = senrima)

Krepusko

**branĉ-konturo
en tag-obskuro
fragment-fingra figuro
himna apoĝaturo**

**formaj filamentoj,
fingraj movimentoj
cedas sone klarvid'
al nokt-instrumentoj**

Anglalingva versio:

Twilight

—In the tradition of Ci, form Qingpingyue

In sky, etched limb
as daytime dies dim
one lone finger, sliver-slim
extended, minimal hymn

Shapes flicker and grow gaunt
night movements fingers flaunt
distinct sight cedes to sound
hands key a nocturne haunt



Foto de Halli Magg

Queqiaoxian (Feino sur Piga

Ponto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 446,
734 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa (x=senrima)

Ekzisto pro bezono

**Ĉu ekzistas
senarbitra
vero absoluta-
aksiomo de ĉio
solida
senrefuta?**

**Ĉu bezono
havi bazon
estas atributa
vero de kerna vero-
esenco
neimputa?**

Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj

Homoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 5 kaj 6 versoj respektive, de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

Fiera malplena vento

I.

**Leviĝas de ebena
sabla raba vent'
mem vakua
sabla donas
formon al ent'**

**Ĝi ŝveliĝas
flosas hejmen
al firmament'
Super maro
sorbas akvon
ĝis korpulent'**

II.

**Nun peza, viv-donanto
ekde sediment'
pluvas sterke
Estas beno
per ben-agent'**

**Nun plumpeza,
aero ne
estas prevent'
de terfrotto
pensas tarde
pri testament'**

Anglalingva versio:

Proud Empty Wind

—in the tradition of Ci, form Renyueyuan

(Rounding of Moon and People)

I.

It rises on the great plain
wind picking up sand
in itself sheer
the grains shape form
substance from land

Air is the home
it swells, massive

and moves out, grand
over the sea
picks up moisture
the grains expand

II.
Heavy now, a life-giver
it rains from the strand
on into crops
a blessing from
a blessing hand

Lighter and slight
mainly air now
it can't withstand
the earth's friction
empty alone
subsides unplanned

Santaici (Tri Terasoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.

Brilgaje!

**Memorigas aŭtun'
ke emas ni morti
sen oranĝfolioj
vivviglaj por porti**

Anglalingva versio:

Brightly now!

—in the tradition of Ci, form Santaici (Three Terraces)

Brightly fall reminds us
of our approaching death
except that we don't have
cute orange leaves at last breath

Aŭtuno rid-ora

**mian linon triku
aŭtuno rid-ora
en arbaran punton
nun bunta sed pora**

**fiksos mi foliojn
bril-ore broditaj
per hom-membroj kiel
fadenoj noditaj**

Stelamikoj

**Taŭga por stel-danci
veŝton de varm-lano
faras amikino
por la ĝentlemano**

**Ŝi kantante dancas
en trikita lino
blanka robo lumas
per stel-ilumino**

**Tra la tero dancas
varmvestita paro
en la tera vintro
sur la stel-altaro**

**Ĉiu dancopaŝo
naskas novamikon
kiu soras supren
en ĉiel-drelikon**

Luna generacio

**Efemera nubo
naĝas al stelarko
kiskarese pasis
kiel patriarko**

**Flustra susureto
de praula spiro
benas ilin vente
formo de zefiro**

**Silka energio
de miljara danco
kreis atmosferon
de nur gassubstanco**

**Ĝi soife sorbas
tiun zefirblovon
kiu oksigene
donas spiran povon**

**La magia paro
longe sopirante
lanĉas sin al lito
nupton akirante**

**Idoj bolas el ŝi
kaj magie, el li
miloj da geknaboj
pretas nun petoli**

**Nubojn ili kaptas
rajdas rondirante
La aerspirantoj
dancas admirante**

**Lunaj hiphopantoj
Kiu povus kredi?
Sed mi vidis kiam
iris mi stelsledi**

*noto: la supraj tri estas respondoj al ĉineskaĵoj
de aliaj. Estus multe pli amuze legi ilin kune.*



Shanhuazi (Monta Floro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de
7,7,73 / 77,73 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,xa
(x=senrima)

Aŭtun-admono

(Admonito respondas: Esperantigu ĝin, sed
revenigu la tildon!)

**Knabo, kulpas la gildo
kiu skribis sur ŝildo
hispanlingve; vi surfis
sur tildo!**

**Ventkapulo, tabulo
montras al aŭtun-mildo
Kio helpus vin vidi-
ĉu bildo?**

Anglalingva versio:

Boy, I blame that bungling guild
who engraved my placard shield
in Spanish; you surfed on the
wavy tild(e)

You unschooled airhead, that board
of joys of fall, was concealed
by language from you, but a
sketch revealed.

Pri ineco en ĉineskoj

**Kompatinda mi estas
senfike mi gestas
ke mi naskiĝis ina
eĉ testas**

**Bardoj emas ignori.
En ĉineskoj mi restas
virseksa; -in' troas, ne
min vestas**

Noto: Denove, mi skribis respondojn al aliaj.

Shaonianyou (Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 5 versoj de
7,5,445 / 75,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa
(x= senrima)

Stranga Besto

**La ĉevalo
staras sola
eĉ kvazaŭ paŭte.
Ĉiogravaj
homaj mastroj
veturas aŭte**

**Stranga besto—
artmetalo
ĝin kovras haŭte.
Skatolforma
uzurpanto
henas tro laŭte**

Shiluziling (Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

mmmmm

Plu!
mi volas en ĉiu tru'
inter ni—
neniu tabu'

For
de pruda ekstera mor'
inter mi-
al mia klitor'

Jes!
karulo, bona progres'
leku al
orgasma promes'

Nun
mi estos via fortun'
mordos por
plezura kacpun'

**Jen
histeria kun-alven'.
hastas al
gastoj ĉe kamen'**



Desegnaĵo 'Eldorado' de Dorina Landar

What I Saw at the Lake
--in the tradition of Ci, form Shiliuziling
(Sixteen Syllable)

Lake
lapping waves leave in their wake

detritus
damaged bits that break

Stone
smooth aged, standing all alone
stoical
waterworn to bone

Tree
towers to eternity
nourishment
draws in from debris

Crow
comes from clouds, for tree does
grow
sustenance
gained from ground below

Esperantigo :

Kion mi vidis ĉe la lago

Lag'
ondŝvelas cele al drag'
Ŝtoneroj
pro tiu ŝtelag'

Ŝton'
staras sola, skrapĉifon'
Stoika
ŝlifita ĝis on'

Arb'
alta turo, ĉielgarb'
Nutraĵon
ĉerpas per rubvarb'

Pig'
plonĝas teren pro prodig'
Abundo
de grundo al tig'

Cindy kaj Vejdo

Tempesto

Vejdo:

**vent'
balais de okcident'
suspiras
floroj en lament'**

Cindy:

**mond'
ni luktas kun ekde fond'
tempesto—
triumfa respond'**

Vejdo:

**ter'
skuas sub tempest-veter'
ni luktas
jen kun sinofer'**

Cindy:

**rit'
ofera pro ter-agit'
por graco
de tempest-spirit'**

Shuidiaogetou (Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive, de 55, 65, 665, 55 / 333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x = senrima)

Aŭtuna ĉampano

**sate flavora
sub la plenluno
sorbis ond-ocean'
manĝon de suno
kies tagondoj sur
ondoj de flua mar'
ŝaŭmas en kuno
Kaj la ĉampanon
trinkas Neptuno**

**noktsfero
celo de
harpuno
Jes, mardio
lunondoj al komuno
ĝojkrie enplonĝas**

**Sed noktoratoro
ĉe stel-tribuno
kontente restas
en ĉi-aŭtuno**



Pentraĵo 'Orinoko' de Jomo Ipfelkofer

Anglalingva versio:

Autumn Champagne

—In the tradition of Ci, form Shuidiaogetou
(Prelude to a Water Melody)

Gorged with yellow gold
under the full moon

the waving ocean sipped
the sun with a spoon
whose day waves diving in
to fluid water waves
form foam widely strewn
and the sea champagne
is sipped by Neptune

Nighttime sphere
target of
a harpoon
Yes, you sea god
my lightwaves to your commune
will joyfully plunge in
But the night orator
at a star festoon
before the dais
gives the fall speech soon

Siyuanren (Sopiro al Fora Homo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de
75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo
xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima)

Poezio Forvagis **(kromnomo: stulta poemo)**

**Sidas mi proksime, for
pensojn mi levas
ekster korpo
ili vagas
kien mi revas**

**Riproĉojn mi ricevas
denove devas
reveni domen
survizaĝe
rideto kreas**

Suzhongqing (Kora Sento)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj
respektive, de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Vjolo

**ofero de konsolo-
purkora rolo
Personoj kiel vi,
kun bona volo**

**estas ja
la vjolo
dum solo
en koncerto-
rara tono
en izolo**

Adstring'

**kruela vintra ating'
per kirlventa sving'
de karno kaj koro
ĝis esperesting'**

**jen tranĉo!
frida kling'
aĉ-adstring'
kuntiros min
al frumorto
nun sendisting'**

Semo

**Vi drinkas pro la premo
de timekstremo
kapklinita, nokte
kreskas mortsemo**

**Solkoro,
brilgemo,
diademo
de verdmondo
vi postvivos
en poemo**

Bondeziron al Via Naskiĝtago

**ĉi-tago kalendara
nun populara
estos festotago**

lukse malŝpara

**najbaro
transmara
sed klara
pro poemoj-
esprimilo
senkompara**

Subite stulta

**jen mi, sen kono multa
subite stulta
eksplodas bole mi
lang-katapulta**

**mi estas
insulta
tumulta
Post detruo
tiam venas
saĝ' konsulta**

Tianxianzi (Fea Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 7,7,73,3,7
silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a (x=senrima)

Ĉarma Guozhu

**kuras Guozhu, ĉarm-feo
antaŭ mi en Ci-kreo
ĉiam je plena tago
kameo
de EO
en frua sun-turneo**

**EO estas la lingva kodo de Esperanto*

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. Ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

En ipernity vole nevole

loto
loto
gvidis al bankroto
vivante cifere
ni rondflugas tere
rete
rete
vortstrioj komete

manko
manko
de mono en banko
Mi devus min levi
sed ne volas devi
vide

**vide
al ekran' senbride**

Ne pensis pri titolo!

**pretas
pretas
mi vin brule petas
ne moku min ŝvebe
sed boru min stebe
beste
beste
JES! mi krias feste!**

**torde
torde
mi fend-faŭkas porde
pulsas via klabo
venas mia rabo
bora
bora
ĉuro seks-trezora**

Hormona hezito

**pensoj
pensoj**

**miksiĝas kun sensoj
volupto latenta
lubrikaĵo menta
tamen
tamen
fremda estas stamen'**

**sentu
sentu
cerbon ne turmentu
konsciencia juko
kaj kisoj sur nuko
konu
konu
kacon, prudo dronu!**

Venko en sonĝo

**flustras
flustras
li kaj eĉ ilustras
pri revo aspira
per zumvoĉo spira:
raspi
raspi
haŭton, tiam jaspi**

**kaŝas
kaŝas
mi min, sed li paŝas
For de mi, diablo!
tio estas kablo!
bloka
bloka
movo mia ŝoka**

**endas
endas
mi la pugnon sendas
ŝovante lin naven
vipe ventro-kaven
venka!
venka!
ripozo surbenka**

Tiaoxiaoling (Flitting Song) is a Ci of six verses of 4, 6; 6, 6; 4, 6 syllables, with a rhyme arrangement of aa,bb,cc. The four-syllable verses consist of two repeated words (which may be shown on separate lines). And the repeated word of the fifth verse has to be a form of anagram (transposed syllables or semi-palindrome), created from the last word of the fourth verse.

Real Diva

**limelight
limelight
bathing the latest sight
with Oscars she's gravid
and we're oh so avid
diva
diva
with worship comes Shiva**

**spotlight
spotlight
burns; journalist's right
with a sinful shiver
her sins they deliver
reviled
reviled
incredibly, she smiled**

Wanghaichao (Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 446,
446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimarango
xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

Al Jakvo

(al mia kunbatalanto, kiu estimas la ĉineskon)

**Griza knabo
revante en
via Antverpeno
Elpaŝas vi
interŝanĝas
revojn por agpeno
en mondareno
Nehaltigebla
fenomeno
malgraŭ batoj
kaj malica veneno**

**Flandra indiĝeno
inda flamulo**

**SAT-gangreno
vi batalas
ĝin bruligas
ĝis nulaparteno
ĉe virtkunveno
Proletfleg-penso
daŭra treno
tra kapo kaj
fajro en abdomeno**

Xiaochongshan (Malgranda Montvico)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,
53,7,35 /5,53,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa
(x=senrima)

Neeviteble

**Ananka forto fluas
nin trenas pluen
sinuas
tra tago ĝis malfruas
Mallumo
kaj ni genuas**

**Ĥrono fluktuas
neniam. Date
detruas
Falĉile kontinuas
kondamno—
ni rendezuas**

Anglalingva versio:

Inevitability
—in the tradition of Ci, form Xiaochongshan
(Small Mountain Chain)

Ananke strength emanates
transports us onward
undulates
through the day till dusk awaits
Darkness-
we kneel in our fates

Chronos fluctuates
never. By the clock
extirpates
the sickle perseverates
Damnation-
us appropriates

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimaranĝo xa,x,a,a (x=senrima)

Sentitole

**printempa
vivkrio pasas
tra la mondo mortlaca
Neĝo ĝin lasas
floroj amasas**



Pentraĵo 'The Big Bloom' de Alina Bradford

Yujia'ao (Fiŝista Fiero)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun 5 versoj
de 7,7,7,3,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,a,a

Ĉielaj tonoj

**La ĉiela koruso:
kontralta kumuluso
mezsoprana nimbuso
stratuso
kaj soprana ciruso**

**Stratuso vastampleksa
tonregistro kompleksa
Mi estas tre perpleksa
inseksa
Sed ne sufiĉe fleksa**

Yulinling (Tintado en Pluvo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive, de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345
silaboj, laŭ rimarango a,xa,xxa,xa,xxa /
a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Ĉu kapuĉini aŭ ne kapuĉini?

Kafeini

ĝis komenci

halucini

Tio estas ĝojo

Mian menson

ilumini

mia celo estas

jam ne min klini

al la lit'

Nur lumadi

mian tagon ne fini

Mi bezonas urini,

doloron

povas difini

Eĉ artikaj ligoj

ĝemas dum

determini

**ĝustan lokon
Ĵuras
jam ne kapuĉini**

**akre mi
dum ekstremaj
paŝoj abstini**



**After the Migraine
(exercise in Yulinling, after my migraine)
--in the tradition of Ci, form Yulinling**

**Maybe in vain
but still I try
Same old refrain-
you know the old saying
it's true, I guess:
no pain, no gain.
I pick myself back up
after the migraine**

**once again
charge at those chores
and try hard not to complain**

**Shower is a soothing rain
disappears
pain down that dregdrain-
into memory fades.**

**Yes I can
always sustain.
Self-compassion,
pity
guests I don't entertain
with head clear
it's time to see
what I can attain**

*Note: **After the Migraine** is one of my least favorite poems. I think it's a little adolescent. But come to think of it, maturity is not something I've grown into yet.*

Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de
7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo

Pensoj dum la danco

**Mi estas en kostumo
por spektkonsumo
Neniu vizaĝfarbo-
kutimo for en ĉoktaŭarbo**

**Mi dancas antaŭ ili
kun flut' por trili
En indiana bando-
laŭ mia propra propagando**

Anglalingva versio:

Thoughts During the Dance

—In the tradition of Ci, form Yumeiren (The
Beauty Yu)

I'm in ancestral costume

clappers to consume

No mark of face paint on me

that's too distant in the Choctaw tree

I'm now displaying dance skill

flute in hand to trill
I'm native ethnicity
believing my own publicity

Savo de Sigfrido

**mi kovas vin en koro
en sanga ĥoro
modesta mia stalo
sonoras tropoj de verdŝtalo**

**vejnvoĉas via ĝesto
per rola gesto
aktoroj en korĉaro
pulskantatas save pri vermcaro**

Kiu, mi?

**Iu tro ofte revas,
atenti devas.
Iu indas torturon
ĉar forgesis pagi fakturon**

**Iu vante imagas
ne taŭge agas
Iu ne estas ĉiu—
ho, kiu estas tiu iu?**

Kata stilo

**venis en kapon nigre—
mi verkas tigre
sen la sagaca drako—
forta spiralo de stomako**

**aŭ ĉu ĉi en la kato
flustros post dato?
kate, mi frapas frazon
kaj enmetas troan emfazon**



*Pentraĵo de 'wild cat-vadmacska-felis silvestris' de
Aleksej Borodin*

Zhegutian (Perdrika Ĉielo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive, de 7,7,77 / 33,7,77 silaboj, laŭ rimarango de aa,xa / xa,a,xa (x=senrima)

Monotona Ĉiusono (Merry Christmas!)

**adoro de mamono
en angla monotono
koncerto de kunsento
ĉar ĉiu estas klono**

**Santa Claus
patrono
verdmona dum sezono
en nova nacieco
tutmonda Ĉiusono**

Zhuzhici (Bambuoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Ĉu mi daŭros?

**"Travivas vintron staŭdo."
Mi hezitas ĉe plaŭdo
de frostiĝonta lago.
En, al ties aplaŭdo**

Etaj etnaj bandoj

**kuniĝintaj staras ni
en etnaj bandoj, ili
dise maldifuzas kaj
krokodilas inter si**

**eksperimenta kobaj'
de verdhoma revo; aj
kuru, kobajo, iu
volas vesti vin en faj'**

**krom ĉikanoj pri ĉiu
bando alia kiu**

**enviinde pli multas,
nur aŭdeblas laŭda bru'**

**kuru kobajo, kultas
tiuj, kiuj insultas
vin prokrastu, dume ni
naciismon sepultas**

Preĝo – Memoru nin

**Dio, en la ĉielo
for de kreita kelo
ke vi rekuperu jam
ke vi igu nin celo**

*glosa: rekuperi: Repreni por uzo ion, kio povus
perdiĝi*

Pri la Oka Ĉina Esperanto-Kongreso

**Bondezirojn, Kongreso!
Estu forta fortreso
provizu ĉiun menson
laŭ ĉies verd-neceso**

Zuihuayin (Ebrio sub Ombro de Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj de 7,5,545
silaboj, laŭ rimarangô a,a,xxa (x=senrima)

Rozkolora

**Sunŝirmaj kaprioloj
sub roztavoloj
en floraj ombroj
Mi strab-diris,
"Sombraj izoloj."**

**Sin klinis ridkoroloj,
dot-alkoholoj
en floraj ombroj
roze drinkas
ni, dum alt-foloj**

Anglalingva versio:

Pink
—in the tradition of Ci, form Zuihuayin
(Intoxication Under Flower Shadows)

Somersaults in the sun-shroud
under a pink cloud
in flower shadows
I turned and said,
"No grim talk allowed."

A full petal laughed and bowed
and nectar endowed
in flower shadows
we drink pinkly
full of life and proud



Desegnaĵo 'Larmaj spuroj' de Mao Zifu

Cikloj

Migrena Ciklo

Senefika medikamento

—laŭ ĉinesko Xiaomeihua (Malgranda Umefloro)

**Sen ŝoso
aŭ roso
forgesiga lotoso
ĉe rando
de lando
fremda staras mi, antaŭ
strando**

**Ĝi volas min aneksi
en ĝian fremdon teksti
Prefaco
al graco
sonoras el granda palaco**

**Sed, ŝlosa
al foso
paŝas mia provoso
girlando
de plando
estas la kruela komando**

**Ĝi volas min ampleksi
sub ĝia povo fleksi
aŭdaco
al paco
kaptas min kredo je kuraco**

Kap-kapero

**—laŭ ĉinesko Yiwangsun (Rememoro pri
Princido)**

**Pensi estas libero!
Tio estis ĥimero
okazadas kapero
de sero,
mia mensa macero**

Cerberaj mevoj

**—laŭ ĉinesko Langtaosha (Ondo lavas
Sablojn)**

**migreno venas
kaj forprenas
internaĵojn gangrenas
cirkulas penso-birdoj
Malterenas**

**Aj, mi komprenas
eĉ divenas**

**Neptuno jakobenas
ondo forlavas sablojn
mevoj svenas**

16, 17-9-2009

**Pri Vejdo
(dum 2009a naskiĝtago de Vejdo)**

—laŭ ĉinesko Rumengling (Kvazaŭsonge)

**Li masonas pene
ponton indiĝene
interliganta
Pasas nun senĝene
plene
plene
ci-torento ĉene**

—laŭ ĉinesko Heyebai (Lotusfolia Taso)

**Ĉineska korbato
Frato
al into
Lanterno de Elerno
Kerno
de onto**

*(into kaj onto ne vere rimiĝas, sed la signifo
estis nerezistebla)*



Enhavolisto de artistoj

- Eder Benedetti p. [36](#)
Alina Bradford p. [15](#), [27](#), [103](#)
Aleksej Borodin p. [110](#)
André Garant p. [51](#)
Sébastien Garant p. [63](#)
Jomo Ipfelkofer p. [38](#), [87](#)
Dorina Landar p. [82](#)
juna Cindy p. [45](#)
Halli Magg p. [22](#), [69](#)
Mao Zifu p. [77](#), [115](#)